


sub la suda kruco ★

ESPERANTO



La nova emblemo de la
**Nov-Zelanda
Esperanto-Asocio!**

Aŭstralia Futbalo - Nia Pasio

Sydney Ŝipvrako Malkovrita

Vojaĝoj al Bonaero

Vizito al CERES

oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asocioj
volumo 16[4] • numero 94 • julio-aŭgusto 2008
ISSN 1038-9380



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIOJ

volumo 16 [4] • numero 94 • julio-aŭgusto 2008

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktoroj | Chris Krügeloh & Sándor Monostori
Kontaktadreso | esk@esperanto.org.au

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au — info@esperanto.org.au

NZEa | www.esperanto.org.nz — nzea@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk@esperanto.org.au".


Limdato por kontribuoj por la sekva numero:

15 de septembro 2008

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj
en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA, aŭ de NZEA.**

Copyright © 2008, AEA & NZEA — ĉiuj rajtoj rezervitaj.



Sur la kovrilo: La emblemoj de la aŭstralia kaj nov-zelanda Esperanto-Asocioj, dezajnitaj de Igor Couto.

Enhavo



4

Antaŭparolo



5

**Naskiĝo de
Ananda Andreas Krügeloh**



6

Aŭstralia Futbalo – Nia Pasio





10

Raportoj el Esperantio



13

Vojaĝoj al Bonaero



14

Vizito al CERES

18

Leteroj al ESK



19

Sydney Ŝipvrako Malkovrita



22

La nova emblemo de NZEA

Julio-aŭgusto du mil ok

Antaŭparolo

La lasta monato estis monato de ŝanĝoj, defioj, kaj antaŭĝuoj. Unue, la novformata *ESK* estis lanĉita per la 93a numero, kaj subite videbla ŝanĝo estis la buntiĝo de nia bulteno. Kiel ofte en la vivo, ŝanĝoj alportas defiojn. Unu tipo de defioj estas por Ŝandor kaj mi lerni la necesajn programojn por ke ni scipovu redakti ĉi tiun bultenon - kaj ni ankoraŭ devas lerni multe pli! Alia tipo de defioj estas por ni ĉiuj certigi ke ĉi tiu nova projekto ja sukcesos. Ne nur ni ĉiam bezonas artikolojn kaj raportojn, sed pli grave, ni bezonas sufiĉe grandan varion de kontribuoj por daŭre kapti la intereson de nia kara legantaro. Laste, mi opinias ke tiuj defioj alportas antaŭĝuojn, ĉar mi forte kredas ke ni ja povos respondi al tiuj defioj.

Por mi persone, la lasta monato alportis eĉ alian aron da ŝanĝoj, defioj, kaj antaŭĝoj. Proksimume samtempe kun la naskiĝo de la novformata *ESK* okazis la naskiĝo de mia filo (bv vidi anoncon dekstre). Estas memevidente ke tiu okazo estas vivŝanĝega kaj plena de ĝojoj kaj defioj. Mi dankas al Ŝandor Monostori por fari la plejmulton de la redaktado por la lasta eldono, kiam mi aŭ estis en hospitalo aŭ dormis. Neforgesende, ni ambaŭ ĉiam povas kalkuli je la pacienca helpemeco de Igor Couto.

Kun tiuj vortoj mi feliĉe prezentas al vi la duan eldonon de la novformata *ESK*!


Chris Krügeloh

Sube: Ŝandor (dekstre) vizitis Chris ĉe lia oficejo en Aŭklando



Naskiĝo de

Ananda Andreas Krägeloh



Ni ege feliĉas anonci la naskiĝon de nia unua bebo je la 27a de junio 2008!

Post mallonga puŝado de Anni, granda estis nia surprizo kiam aperis filo, ne filino! Dum la lastaj monatoj ni estis pretaj por filino kaj eĉ jam nomis la bebon en la ventro *Anita*. Hazarde, tiu nomo estas kaj tajlingva kaj eŭropa nomo, kaj pro tio la nomo sonus malstrange por la familioj de ambaŭ Anni kaj mi.

Kompreneble, kiam naskiĝis ne filino, ni devis serĉi novan nomon. Ni havis iom da prefero por taja antaŭnomo ĉar Anni jam adoptis mian germanan familian nomon post nia edziĝo antaŭ du jaroj. Post iom da pensado ni fine decidis je la antaŭnomo *Ananda* kiu signifas feliĉo. La origino de la nomo estas en la sanskrita kaj palia lingvoj. Kun la alveno de la budha kredo al Tajlando ankaŭ venis influoj de tiuj lingvoj sur la tajan, kaj nuntempe la nomo *Ananda* estas dise uzata en Tajlando, Barato kaj Srilanko. La nomo ankaŭ estas bone konata pro la fama studento de la Budho.

Por meza nomo ni decidis je *Andreas*. Tiu nomo estas origine de la greka kaj nuntempe estas uzata en tiu formo en kelkaj eŭropaj landoj, inklude en Germanio. La angla versio de la nomo estas *Andrew*.

Ni ege fieras pri nia kara filo Ananda. ★



Aŭstralia Futbalo —

Nia Pasio

de Stephen Pitney

Krom la manĝaĵo *Vegemite*, mi povas pensi pri nur unu ero inventita en Aŭstralio kiu estas ankaŭ kulture signifa. Kompreneble ĝi estas nia nacia ludo - aŭstralia futbalo. Ĉi tiun jaron ni celebras la 150an datrevenon de tiu sporto. Eĉ multaj aŭstralianoj surpriziĝus kiam ili ekscias ke aŭstralia futbalo fakte estas la plej malnova kodo de futbalo kiu ekzistas en la mondo!

Je la Komenco

Kelkaj fruaj formoj de futbalo estis luditaj antaŭ la apero de aŭstralia futbalo, ekzemple, en privataj lernejoj en Anglujo en 1823. Alia frua formo ankaŭ estis ludita per la indiĝena popolo de Irlando, kiu nomis ilian ludon *Caid*. Malgraŭ tio, neniu el tiaj fruaj formoj nek estis kodigita nek ekzistas nuntempe, kiu signifas ke aŭstralia futbalo estas la plej malnova kodo de tia sporto.

En Aŭstralio, novaj tipoj de sportaj ludoj kun diversaj reguloj komenciĝis ĉirkaŭ 1850, tamen la reguloj ne estis formale verkataj en kodon ĝis 1858 en Melburno.



La ĉefa kreinto, Tom Wills, kun malgranda komitato konsideris regulojn de diversaj anglaj ludoj kaj fame deklaris "Ne, ni devus havi nian propran ludon".

Ekzistas iom da similecoj al la nuntempa irlanda futbalo kiu estis kodigita poste en 1874, kaj laŭ la eminenta historiisto Prof. Geoffery Blainey la irlanda ludo estis influita de la aŭstralia ludo kaj ne alidirekte. Angla futbalo (uson-angle: *soccer*) estis kodigita en 1860, rugbeo en 1874, kaj usona futbalo en 1869.

Aliaj historiistoj forte asertas ke aŭstralia futbalo estas bazita sur la ludo *Marn Groom* de la aŭstralia indiĝena popolo kiu uzas pilkon farita el didelfhaŭto. Ĉi tiu ludo aperis en fruaj raportoj kaj pentraĵoj, sed la vereco de tiu aserto ankorau estas debatata.

Je la komenco aŭstralia futbalo estis ludita en granda nombro de parkoj. Fakte ĝi prunteprenis iom da reguloj de la fruaj formoj de rugbeo, sed ili rapide ŝanĝiĝis, kaj la ludo evoluis al tute unika sporto baldaŭ ludita en ĉiuj provincoj de Aŭstralio.

Tiam, homoj laboris ses tagojn dum semajno kaj povis nur malfacile vojaĝi. Tamen post 1870 kluboj de Sidnejo, Melburno kaj Adelajdo vizitis unu la alian per marborda ŝipo por interprovincaj konkursoj.

Malsukceso en Nova Sud-Kimrio

Kvankam la ludo stariĝis frue en Sidnejo, ĝi neniam bone prosperis tie - la ĉefa kialo estis politika! Forta rivalado ekzistis tiam inter Nova Sud-Kimrio (NSK) kaj Viktorio, kiu iomete ankoraŭ daŭras ĝis hodiaŭ, kaj la kodo de futbalo havis gravan rolon en ĝi.

Unue, la sporto estis nomita *Victorian Rules* kiu kompreneble ne estis akceptita de NSK. Malsaĝe, la spertaj melburnaj teamoj humiligis la sidneajn teamojn en fruaj konkursoj en Sidnejo, kiu eĉ plue kontraŭigis la ludon al la lokaj homoj. Je tiu tempo la loĝantaro de Sidnejo estis pli malgranda ol la loĝantaro de Melburno, sed pro siaj pli proksimaj ligoj al Anglujo decidis adopti la anglajn ludojn. Hodiaŭ angla futbalo kaj la du modernaj kodoj de rugbeo estas preferataj kaj ili havas siajn proprajn historiojn kaj tradiciojn. Fakte, ĉijare estas ankaŭ la celebra jaro por la pli nova kodo *Rugby League*, kiu komenciĝis en 1908.

Pro tiu decido kaj poste pro la kreskado de Sidnejo kaj ĝia kontrolo de komunikado en la lando, la kreskado de la aŭstralia ludo severe suferis en NSK kaj Kvinslando - plue ili eĉ mem plezuriĝas kritiki kaj malpli grandigi la statuson de nia nacia ludo!

Aŭstralia Futbalo en Nov-Zelando

Aŭstralia futbalo stariĝis en Nov-Zelando en 1876, kaj baldaŭ ekzistis teamoj eĉ en preskaŭ ĉiu urbeto en la suda insulo de la lando. Fakte en la haveno de Nelson, agnoskita naskiĝloko de rugbeo en Nov-Zelando en 1870, jam komenciĝis aŭstralia futbalo en 1869.

Aŭklando ankaŭ havis multajn klubojn de aŭstralia futbalo, inkluzive de *Eden FK*, kiu gajnis la ĉampionadon *Auckland Australian Football League Premiership* en 1907 kaj 1908.

En 1908, teamo de Nov-Zelando partoprenis la *Australasian Football Jubilee Carnival* en Melburno. Vestitaj en nigra

**" aŭstralia futbalo
estas la plej
malnova kodo de
tia sporto "**

kun ora filiko (ne arĝenta) ili faris la *Māori Haka* en la fama Melburna stadiono *Melbourne Cricket Ground (MCG)* antaŭ 8 000 spektintoj.

La teamo batalis kontraŭ Viktorio, NSK kaj Kvinslando kaj gajnis kontraŭ la lastaj du. La kapitano de la nov-zelanda teamo, Tom Wright, estis mortigita en Francujo en 1916. Antaŭ la unua mondmilito ekzistis 115 kluboj en Nov-Zelando, sed aŭstralia futbalo ne revigliĝis post la milito.

Parte pro la translokiĝo de homoj kaj financoj de la suda insulo al Aŭklando, kiu havis proksimajn ligojn al Sidnejo kaj Britujo, kaj pro granda enmigrado de homoj el Britujo en 1870, kie rugbeo kaj angla futbalo estis tiam starigitaj, aŭstralia futbalo malsukcesis en Nov-Zelando, kaj fine rugbeo superis. Alia ĉefa kialo kompreneble povas rilati al la nomo de la ludo kaj fakto ke estas longa historio de rivalado inter Nov-Zelando kaj Aŭstralio. Tamen, nuntempe ekzistas kvin ligoj en Nov-Zelando: Canterbury, Waikato, Wellington, Otago kaj Auckland (rigardu al <http://www.nzafn.co.nz>). Dum la jaroj, Nov-Zelando produktis dek ludantojn kiuj bone rolis en la aŭstralia futbala ligo (AFL). Nuntempaj ludantoj estas la brila Trent Croad kaj Adam Campbell.

“ La sporto estas la plej efika rimedo por unuigi nian unuan populacion ”

Multkulturismo

Anstataŭ la registaro, aŭstralia futbalo antaŭenirigis la vojon por multaj sociaj aferoj, ekzemple rasa toleremo kaj indiĝena reaktoriĝo.

La sporto estas la plej efika rimedo por unuigi nian unuan populacion, nuntempe kun pli ol 10% da indiĝenaj ludantoj en AFL, kiu estas la plej alta nivelo de la sporto. Kun brilaj lertuloj ili gajnas la respekton kaj amon de ĉiuj subtenantoj kaj prezentas pozitivan kaj fieran ekzemplon por multaj junaj indiĝenoj.

Kiel en la pasinteco, ludantoj de juda, itala, greka komunumoj kreis kulturajn grupojn. Nun la unua islamana ludanto por *Essendon FK* alportas bonvenigon kaj akcepton de nova granda islama grupo.

La ludo hodiaŭ

Certe ne ĉiuj interesiĝas pri futbalo, tamen por plejparto de la populacio aŭstralia futbalo estas tre grava afero - simile al religio. Kun centoj da ligoj tra la lando, ne estas nur ludo sed integra parto de le kulturaj kaj sociaj vivoj de multaj aŭstralianoj kaj en la urboj kaj en la kamparaj urbetoj. La ludo forprenas sociajn kaj profesiajn, religiajn kaj rasajn diferencojn, kaj rimarkinde, 50% de la spektantoj estas inaj.

La ludo havas riĉan historion kaj tradicion kaj dum la jaroj produktis multajn heroojn, legendojn kaj neforgeseblajn kaj emociajn momentojn.

Kvankam la ludo estas la plej bona sporto en la mondo, ĝia estonteco ne estas certa. Simile al indiĝenaj lingvoj, por supervivi la ludo devas batali kontraŭ multaj fortegaj internaciaj influoj. Nuntempe ekzistas multaj konkurencoj, ne nur aliaj sportoj sed multaj diversaj formoj de distraĵoj, kiuj forprenas homojn el tradiciaj okupaĵoj.

La plej granda timo estas la rapida kresko de angla futbalo, kiu havas subtenantojn mondscale, grandegajn financrimojn, fortan komunikan influon kaj la grandan avantaĝon de tujaj subtenantoj en la aro da enmigrantoj.

Dume pligrandigo de enmigrado alportas multajn profitojn al la aŭstralia socio, plejparte migradaj sportaj preferoj estas starigitaj. Ĉiuj kiuj alvenas en Aŭstralion scias nenion pri nia nacia ludo. Ŝajnas plejparte ke enmigrantoj posedas senson de kultura hegemonio kaj kompreneble ili ne estas allogataj al 'malsupra' fremda ludo kaj kulturo. Plue, la sportaj elektoj de iliaj infanoj estas influitaj de ili.

Aŭstralia futbalo ne estis ludita en internaciaj konkursoj, kiu estas malavantaĝo por ĝi. Mi kredas ke la manko de partopreno de aliaj nacioj estas nur ĉar la ludo ankoraŭ ne havas neŭtralan sennacian nomon. Tamen, nuntempe en la AFL ekzistas ludantoj el Irlando, Koreio, Brazilo, Fiĝio, Nov-Zelando kaj aliaj landoj. ★

**“la ludo devas
batali kontraŭ
multaj fortegaj
internaciaj influoj”**



Anne Mürseler | Everystockphoto

Maldekstre: Angla futbalo estas populara tra la tuta mondo.

Bazita sur materialoj de la libro A game of our own far de Geoffrey Blainey (2003), kaj materialoj en Vikipedio.

Raportoj el

Vizito al *Gopals*

Mardon, la 13an de majo 2008, grupo de Esperantistoj iris al *Gopals* en la urbocentro de Melburno. *Gopals* estas unu el la plej bone konataj vegeteranaĵ restoracioj en Melburno, kiu malfermiĝis antaŭ 24 jaroj.

Por tiuj, kiuj ŝatas manĝi legomajn lazanĵojn, kareojn, kaj pastojn, ĉi tiu restoracio estas vizitinda loko. En la menuo estas supoj, salatoj kaj fruktosukoj kaj tiel plu. Mi manĝis legoman pastinecon kaj baratan legoman manĝaĵon, kaj ili estas tre bongustaj.

La manĝĉambro estas agrabla kaj havas pentraĵojn pri barata kulturo sur la muroj. Unu el la kialoj por la vespermanĝo estis celebri la viziton de Jano el Sidnejo. La evento estis sendube sukcesa afero.

La bildo en la mezo de la suba foto montras du baratanojn. Kriŝno estas la maldekstra individuo en la pentraĵo, kaj li estas identebla per sia blua haŭto. Je la antaŭo de la foto estas ekzempleroj de la libro *Esperanto por Infanoj*. Nia celo estis

elekti la plej bona(j)n koloro(j)n kaj desegno(j)n por la etikedoj, kiuj reklamas pri Esperanto en Aŭstralio kaj estos metitaj sur la lernlibrojn. ★

Ero de Kam Lee.



Sube: malantaŭe, maldekstre al dekstre: John, Richard, Andrew kaj Kam.

Antaŭe, maldekstre al dekstre: Elrae, Jano, Jenny, Miranda kaj Caro.

Esperanta leciono en Litovio

En septembro 2007 mi, Petro Danzer el Kvinlando, vizitis mian leteramikon por dek jaroj, Linas Parulis. Ekde la komenco de nia renkontiĝo en la flughaveno de Vilnius ni komunikadis en Esperanto. Ĉar ni ambaŭ ne flue parolas Esperanton ni multe uzis vortarojn.

La ĉefaj celoj de mia vizito estis vidi la malnovan



domon de miaj geavoj en la regiono kiu antaŭe estis nomita Memellando, kaj viziti aliajn apudajn lokojn interligitajn kun la vivo de mia familio. Sen la helpo de mia Esperanto-amiko, mia vizito estus multe malpli sukcesa.

Longe vivu Esperanto! ★

Ero de Petro Danzer.

Maldekstre: Petro Danzer kun amikoj apud la rivero Memellando, estinta la hejmo de la familio Danzer.

Esperantio

Torquay Esperanto Coffee Club

On the right are photos taken in the *Council Chamber* at the *Surf Coast Shire* offices in Torquay on Thursday morning, 22 May 2008.

Since our formation three years ago, the *Torquay Esperanto Coffee Club* have been working towards recognition in the larger community. From meeting in a private home, we have moved to the *Community House* and advertise our monthly meetings in the local newspapers. Last December we took part in the Torquay community's annual *High Tide Festival* where we found that it would have been nice to have our own banner. Being also short of dictionaries, we submitted an application for a community grant through the *Surf Coast Shire*. We have been awarded \$720 — money that will be well spent.

The presentation photo (top right) shows John Adams on the left, the Mayor Cr. Dean Webster in the middle, and Elrae Adams on the right. Marumi Smith took the photo and is shown in the photo below where other recipients are also shown. ★



*Ero de John Adams, sekretario de la
Torquay Esperanto Coffee Club.*

Seeking Old Esperanto Phrase Book

The Esperanto League of WA is seeking copies of an old Esperanto phrase book for sale or by donation. The book is small and purple in colour with the title 'SAY IT IN ESPERANTO' Numbered ISBN 0-486-20820-6. Published by Dover Publications in 1951, by George Alan Connor & Doris Tappan Connor.

Could anyone who has unwanted copies please contact:

Trish O'Connor, 87 Contour Drive,
Mullaloo 6027, WA
or
email: trish_o_connor@hotmail.com ★

Raportoj el Esperantio

En la *Melbourne Esperanto-Kafo-Klubo* ni kore bonvenigis Dianne Lukes, la novan prezidantinn de AEA. Post iom da gramatikumado, ni diskutis diversajn aferojn kaj ofertis al ŝi nian subtenon kaj emon kunlabori por bona estonteco de la Esperanto movado en Aŭstralio. ★

*Sube, el maldekstro al dekstro:
Kam, Andrew, Barrie, Miranda, Dianne, Jenny,
Carol and Alan.*



Aŭstralia Kongreso de Esperanto 2008

La 2008a Aŭstralia Kongreso de Esperanto okazos en **Hobarto, Tasmanio**, de la 24a ĝis la 26a de oktobro.

La kongreso komenciĝos per renkontiĝa vespero je la 24a kaj inkluzivas jarkunsidon de la Aŭstralia Esperanto-Asocio sabaton, la 25an de oktobro.

Ni eble organizos kunan postkongresan ekskurson ĉirkaŭ Tasmanio per aŭtobuso ekde la 27a ĝis la 29a.

Venu por ĝoji kaj societumi!

Bonvolu kontakti Robert Budzul je rbudz888@yahoo.com.au ★

Vojaĝoj al Bonaero

de *Ŝandor Monostori*

Pasintoktobre mi partoprenis konferencon pri dermatopatologio en Bonaero (*Buenos Aires*). Mi restis tie dum unu semajno kaj havis iom da tempo por renkontiĝi kun lokaj esperantistoj. Ni tagmanĝis kune en tre agrabla restoracio. Unu el la lokaj esperantistoj, Roberto Sartor ankaŭ montris al mi la Bonaeran Esperanto-Klubon, sed tiu-foje ne estis kunveno en la klubo.

Bonaero plaĉegis al mi. Ĝi estas urbego kun 12 milionoj da loĝantoj, havas riĉegan kulturen vivon, bonajn eblecojn amuziĝi kaj butikumi, precipe por aĉeti bonkvalitajn vestaĵojn kaj ŝuojn. Momente la^a valuta interŝanĝo favoras al vizitantoj de Aŭstralio tiel, ke la argentinaj prezoj estas relative malaltaj. Argentino estas ankaŭ fama pri siaj bovaĵoj kiujn mi ĝuis multfoje.

Ĉi-marte mi denove Bonaeriĝis dum kelkaj tagoj post konferenco pri patologio en Denver, Usono. Ĉi-foje mi ankaŭ iris al la Esperanto-klubo sabatvesperon. Estis kelkaj esperantistoj tie laborante energiplene reordigante ilian bibliotekon.

Antaŭ du jaroj mi komencis lerni la hispanan lingvon. Miaj vizitoj al Argentino donis al mi bonajn oportunojn por praktiki la hispanan. Nuntempe estas relative facile flugi el Aŭstralio al Sud-Ameriko. La kompanio *LAN Chile* flugas de Sidnejo al Santiago kaj survoje haltas en Aŭklando. Ekde novembro estos tri senhaltaj flugoj de Sidnejo al Bonaero flugante trans Antarktiko.★



Supre: Ŝandor kun membroj de la Bonaera Esperanto-Klubo

Vizito al CERES

de Kam Lee

Dimanĉon, la 11an de majo 2008, kelkaj esperantistoj iris al CERES en Brunswick, kiu estas loko en norda parto de Melburno kaj estas proksimume dek kilometroj for el la urbocentro. La loko estas relative nova, ĉar proksimume, antaŭ 30 jaroj, ĝi estis rubejo kaj neuzebila tero.

La loko nun estas media edukadcentro (*environmental education centre*), kies ĉeftemoj estas mondvarmiĝo (*global warming*), akvo- kaj energio-konservado, kaj minimumigado de rubo. La centro estas ankaŭ uzata por organika farmado, ekologiaj ĝardenoj, riparejo por bicikloj, diskutforumoj, festivaloj kaj informejo pri la *Wurundjeri* indiĝena popolo. CERES fakte, estas akronimo de la angla "Centre for Education and Research in Environmental Studies". Se oni tradukus la nomon en Esperanton, la akronimo estus CEEMS: Centro por Edukado kaj Esplorado en Mediaj Studoj.

Kelke de la interesaj konstruaĵoj kaj artaĵoj en CERES estas la vombatotendoj, la dratbildo, la sunpaneloj kaj la blua muro.



Maldekstre:
Kunsido ĉe la indiĝenaj
bestotendoj.

Estas tri tendoj en la sama loko. Kutime ili estis faritaj el akvoimuna tolo aŭ felo, sed anstataŭe ili estas supozeble faritaj el vitrofibraĵo (*fibre glass*). Indiĝenaj bestoj estis pentritaj sur ĉi tiujn tendojn.

Ni feliĉe fingromontris je vom-bato, kiu estas marsupiulo kun ronĝodontoj kaj fortaj ungegoj taŭgaj por fosado. La herbavaraj bestoj manĝas arboradikojn, arboŝelojn kaj herbojn. Ili rilatas al la didelfo kaj bonkonata koaloo. La bildo estas eble 60 cm longa, sed la realaj bestoj maksimume povas esti 1,2 m longaj kaj povas pezi 39 kg.

La artaĵo estas farita el drato kaj montras vizaĝon de viro. Amiko de mi komentis, ke eble la verkisto pripensis kaj estis instigita pri la amebo dum la konstruado.

La suba foto ŝajngigas ke ni fingromontras je la suno, sed oni povas dubi tion pro du kialoj. Se vi ne povas dedukti tion, la respondoj estas jenaj:


a) La ĉielo aspektas nubkovrita, kaj fakte oni ne povis vidi la sunon.

b) La moveblaj lumkolektiloj frontas je la mezo de la ĉielo kaj implikas, ke la suno estis je alta angulo en la ĉielo.

Dum ĉi tiu foto estis farita, ni rigardis je la sama punkto en la horizonto kaj ne al la suno.

La blua muro estas bela artaĵo kiu havas maksimume 3 m altaj kaj estas blukolora pro la uzado de multaj malgrandaj bluaj ceramikajoj. Rimarkindaj fizikaj trajtoj de la vertikala konstruaĵo estas la onda alteco de la muro kaj la spiralaspekta fenestro.

En la mezo de la montrita parto de la muro estas *Azure* alciono, kiu kutime estas 18 cm longa kaj kaptas fiŝojn en enlandaj kaj marbordaj riveretoj de norda kaj orienta



Supre: La dratbildo.



Maldekstre: Sunlumkolektiloj (solar panels). Sed kie estas la suno?



Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto



Lernu kaj ĝuu Esperanton en belega Sidnejo!

de la 11a ĝis la 25a de januaro 2009

- komforta loĝado en la urbocentro de Sidnejo
- kursoj por ĉiuj niveloj – kaj speciala kurso por infanoj
- vizitu la Havenponton, la Operodomon, kaj la plaĝon de Manlio
 - ekkonu la ekzotikajn faŭnon kaj florojn de Aŭstralio
- ludu, babilu kaj societumu kun esperantistoj el la tuta mondo
- eltrovu pri la aŭstraliaj kulturo kaj historio per vizitoj al muzeoj kaj artgalerioj
 - ekskursu al la klifoj kaj kavernoj de la magiaj Bluaj Montoj
- partoprenu la viglan noktan vivon de Sidnejo – per Esperanto



<http://aesk.esperanto.org.au>




*Maldekstre:
Starantaj kaj sidantaj antaŭ la blua
muro. El maldekstro al dekstro:
Miranda, Kam, Anita, Carol, Andrew,
Luke kaj Ian.*

Aŭstralio. La alciono birdfamilio ankaŭ
enhavas la bonkonatan birdon, kiu estas
la kukaburo.

CERES estas vizitinda loko kaj havas
interesajn artaĵojn kaj prezentas meto-
dojn, kiuj kontribuas al la konservado de
la mondo. Informo pri *CERES* estas
havebla ĉe www.visitvictoria.com.au ★

*Dekstre: La dekstra parto de la bele
desegnita, blua muro, vidita el la antaŭo
de la enirejo.*



Leteroj al ESK

Esperanto-revanto je Alice Springs

Mi ege ĝojas legi de esperantaj gefratoj kiuj ĉeestas la reakordiĝon organizitan de *GetUp*. Ĉi tie en *Alice Springs* (Fonto Alis) ni sentas nin je la koro de la luktoj de niaj indiĝenaj samlandanoj.

La rezultoj de la intervenada politiko de la eksa ĉefministro Howard ĉirkaŭas nin. La kuraĝaj luktantoj kontraŭ racismo, senlaboreco, mizero, alkoholaĵoj, kaj ĉiuj aliaj aferoj indiĝenaj estas ĉi tie, je niaj vizaĝoj.

Kelkaj homoj elektas loĝi ĉi tie. Ni laboras kun indiĝenoj, kaj la laboro estas refreŝiganta kaj provokanta. Ni sentas nin for de la avareco kaj kreskado de la resto de la lando. Nur ĉi tie oni vidas kulturon havantan pli ol 40 000 da jaroj. Nur ĉi tie oni laboras kun kolegoj kaj klientoj kiuj parolas la anglan lingvon nur kiel 7an lingvon, post *Warlpiri*, *Arrente*, *Pintubi-Luritja*, *Pitjantjara*, *Kaytyere*, kaj *Anmatjera*. Bedaŭrinde, neniuj scias Esperanton, kaj la luktoj pri lingvo ne estas la plej gravaj.

Dianne, mi ŝatas legi pri via reakordiĝo kvankam ne ĉestis indiĝenoj. Ili forestas aŭ malvideblas — eĉ

en *Redfern*, centro de la indiĝenaj popoloj de Sidnejo. Certe la urbaj indiĝenoj luktadas ankaŭ, same kiel iliaj foraj gefratoj, eĉ kontraŭ la malvidebleco, kiun la indiĝenoj de la dezerto ne frontas.

Plue — mi ŝatas la multkoloran *ESK*, kaj la eron pri Esperanto-instruado en Perto de Vera Payne. Vera, vi certe investas vian tempon kaj laboron dum multaj jaroj kaj mi

dankas al vi denove.

Dankon Vera, mi ankoraŭ ŝatas legi de vi. ★

“Dankon Vera, mi ankoraŭ ŝatas legi de vi”

Rosalie Schultz

**ESK
bonvenigas
leterojn al la
redaktoroj kaj
respondojn al
antaŭe aperigitaj
artikoloj.**

Sydney Ŝipvrako Malkovrita

de June Perkins

La 16an de marto 2008, la ĉefministro Kevin Rudd anoncis la trovon de la frakasajo de la germana rabŝipo *Kormoran* apud la marbordo de Okcidenta Aŭstralio. La fondaĵo *Finding Sydney Foundation* estis serĉanta la ŝipon en la espero ke tiu ŝipo helpus ilin malkovri la lokon de *HMAS Sydney*, kiu sinkis kiel rezulto de batalo inter la du ŝipoj, *HSK Kormoran* kaj *HMAS Sydney* apud la marbordo de Okcidenta Aŭstralio je la 19a de novembro 1941. La serĉareo estis ĉirkaŭ 200 km okcidente de *Steep Point*.

La fondaĵo komencis serĉi frue en marto, utiligante sonar-ekipaĵon sur la ŝipo *Geosounder* ĉirkaŭ 200 naŭtikaj mejloj for de la marbordo de *Shark Bay*. "La eltrovo de la *Kormoran* signife kreskigos la ŝancojn ke la *Sydney* troviĝos", diris la prezidanto de la fondaĵo, Ted Graham. En la sekvantaj tagoj, fotoj de la *Kormoran* vidiĝis sur la televid-ekranoj. Tio ebligis per la uzo de *ROV*, la telekomanda subakva veturilo, enhavanta alte fokuseblan fotilon por foti la vrakojn.

Post la batalo inter la du ŝipoj, la ŝipestro de la *Kormoran* ordonis sian ŝipanaron forlasi la ŝipon post kiam ĝi trafiĝis per tro multe da torpedoj, kaj li eksciis ke la ŝipo sinkos rapide. Do, la germanaj maristoj eniris la savboatojn kaj la plejparto alvenis ĉe la marbordo sen plua problemo. Poste, aliaj ŝipoj trovis la maristojn de la *Kormoran* kaj portis ilin al sekureco. De la 397 ŝipanaro de la *Kormoran*, 317 saviĝis kaj fariĝis militkaptitoj ĝis la fino de la milito.

Sed kio okazis al la *Sydney*? La registaro ne ricevis ian mesaĝon de la *Sydney*, nek de komercaj ŝipoj veturantaj la kutimajn vojojn. Ŝajne ĝi tute malaperis. Kiel rezulto, multaj onidiroj cirkulis. Ĉu la registaro havis la informon, sed ne volis doni ĝin al la populacio? Ĉu la malamiko

havis sekreton batalilon? Ĉu la malamiko ja kaptis la *Sydney*?

La germana ŝipestro kaj la maristoj donis siajn rakontojn, kaj ĉiuj konsentis ke la *Sydney*, brulanta sed ankoraŭ flosanta, forlasis la batalejon. Aviadiloj serĉis la lokon kiel priskribite de la ŝipestro, sed malkovris nenion. Kontraŭgermana sento dum la milito ankaŭ instigis malkredon pri la germana rakonto de la batalo.

La tiama ĉefministro, John Curtin, timis dissendi la informon. Se la malamiko komprenus ke la okcidenta marbordo de Aŭstralio estis senprotekta – kio okazus? Sed, post iom da prokrasto, la trista novaĵo dissendiĝis. Aŭstralianoj pro tio spertis fortan senton de la seriozeco de la militsituacio. Vere, la tuta lando funebris la maristojn de la *Sydney*. Aparte por la familioj de tiuj maristoj, la perdo de la *Sydney* restis granda tragedio.

Dume, la *Geosounder* daŭre sekvis la informojn, kiujn tajdoj kaj geografio diktis kiel la probablajn vojon de la *Sydney*. Nur unu maristo, ŝajne, eskapis per savboato, sed li mortis antaŭ ol li atingis landon, kaj tiutempe neniu pensis pri maristo el la *Sydney*.

Nur kelkaj tagoj post la raporto pri la malkovro de la *Kormoran*, la ĉefministro povis raporti ke ankaŭ *HMAS Sydney* estis trovita. Baldaŭ fotoj de la profundoj kie la ŝipo kuŝis, aperis sur niaj ekranoj. Spertuloj pensadis pri kio igis la *Sydney* sinki. Kiam ambaŭ ŝipoj estis ricevintaj multajn frapojn, la *Sydney* tur-

niĝis norden. Ĉu la ŝipestro kredis ke la ŝipo estos savebla? Eble li kredis ke la fajroj povos esti estingitaj, do li formovis ĝin por labori pri tio. La spertuloj konjektis ke, surbaze de la trovoj, la sekvonto okazis. Subite, la pruo disfalis malsupren. Tuj, la ŝipo perdis ĝian ekvilibron, kaj rapide sekvis la pruon malsupren kun la tuta ŝipanaro.... perditaj. Ŝajne, la maristoj ne sciis ke la pruo jam ricevis mortigan frapon, alie ili povus eskapi per la savboatoj.

La tuta ŝipanaro de 645 maristoj iris malsupren kun la ŝipo en la Hinda Oceanio, kaj la loko de la ŝippereo estis misterio dum 66 jaroj. La registaro unue diris al la familioj ke la maristoj estis mankantaj. Estis nur je la fino de la Dua Mond-Milito (1945) ke la familioj ricevis la informon ke la mankantaj estis fakte mortintaj. Pro la manko de informo, multaj familioj daŭris esperi ke, iam, iliaj mankantaj filoj, edzoj aŭ patroj revenos al ili.

“la familioj ricevis la informon ke la mankantaj estis fakte mortintaj.”

Por helpi la serĉon, la fondaĵo rekrutis David Mearns, kiu jam havis reputacion kiel vrakotrovisto. David Mearns utiligis la sekretan raporton kiun la ŝipestro de la *Kormoran* enkodigis en vortaron. Plie, la fondaĵo havis la plej bonan novan ekipaĵon haveblan en 2008 por helpi ilin. Aparte valorebla estis la *ROV*. Tiuj plibonigaĵoj ebligis sukceson, kiun aliaj serĉistoj ne povis ĝui. Aldone, la dediĉitaj membroj de la fondaĵo laboris dum multaj jaroj en la serĉo de la *Sydney*. La registaro de Aŭstralio provizis multe de la mono por la serĉo, sed multaj privataj personoj ankaŭ donis jarojn de senpaga laboro kaj monon al la celo. Multaj aŭstralianoj ĝojas ke, fine, ĉi tiu misterio estas solvita. ★



Tom Jervis | Everystockphoto

Supre: lu tipo de ROV.



Nova oficiala emblemo

de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

Okaze de la lanĉo de la novformata *ESK*, la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio adoptis oficialan emblemon. La emblemo estas samstila kiel la emblemo de la frata Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj ankaŭ dezajnita de Igor Couto.

La decido pri la emblemo estis facila. Oni opiniis ke la emblemo devas enhavi subite rekoneblan simbolon de la nacio. La plimulto da eksterlandanoj asocias Nov-Zelandon kun la kivio, kaj pro tio la neflugebla birdo estis elektita prefere ol aliaj proponoj kiel la arĝenta filiko. Oni ankaŭ opiniis ke alia avantaĝo elekti beston estas ke ĝi igas la emblemon pli similaspekta kun tiu de la frata AEA, kiu enhavas kanguruon.



RobK | Everystockphoto





New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

David Ryan | President
ryangomez@xtra.co.nz

Chris Krägeloh | Vice-President
esk@esperanto.org.au

Donald Rogers | Treasurer
dero9753@ihug.co.nz

Bradley McDonald | Secretary
bradley.m@whoosh.co.nz

Howard Gravatt | Assistant Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Member
erin.mcgifford@press.co.nz

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the public about Esperanto, and organising the annual NZEA conference.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(+61 2) 9319 4775

Dianne Lukes | President
prezidanto@esperanto.org.au

John Abood | Administrative Director
admin@esperanto.org.au

Stephen Pitney | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Miranda Lutz | Dir. of Member Services
servoj@esperanto.org.au

Jonathan Moylan | Dir. of Promotion
informado@esperanto.org.au

Jennifer Bishop | Director of Education
edukado@esperanto.org.au

Kay Andersen | Dir. of Implementation
utiligado@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



FEED YOUR BRAIN ESPERANTO

Esperanto is a fascinating language. Some learn it for travelling, others for corresponding with penpals, or chatting to people from all over the world over the internet.

Others learn it just to exercise their brain.

BRAINFOOD

WWW.ESPERANTO.ORG.AU • WWW.ESPERANTO.ORG.NZ

Due to its easy grammar and clever word formation system, you can learn Esperanto faster than any other language.